



Chapter 9

Common Words with Example Sentences

The following words were taken from the word list of the book *Vere aŭ Fantazie* by Claude Piron. The sentences were created for this chapter or found in *Reta Vortaro* (www.reta-vortaro.de). Hopefully they will help you to understand the words and also, little by little, to memorise many of them.

(tr) means that a verb is transitive, so it can have an object.

(ntr) means that a verb is intransitive, so it **cannot** have an object.

(x) means that a verb can be transitive or intransitive depending on the context.

aĉeti (tr) - to buy

- Aĉetu ankaŭ panon, mi petas. - Please buy bread also.
- Hieraŭ mi aĉetis novan biciklon. - Yesterday I bought a new bicycle.
- Li tre ŝatas aĉetumi. - He loves shopping.

aero - air

- La aero estas freŝa en la montaro. - The air is fresh in the mountains.
- Bonus iom aerumi la dormoĉambron. - It would be good to air out the bedroom a bit.
- Mi ŝatus vojaĝi en aerbalono. - I'd like to take a hot air balloon trip.

afero - thing, matter

- Ŝi parolis pri tre gravaj aferoj. - She spoke about very important things.
- La afero ne urĝas. - The matter isn't urgent.
- Ĉu ili du havas amaferon? - Are those two having an affair?

agi (ntr) - to act

- Ni devas agi nun! - We must act now!
- Ili estas tre agemaj. - They're very active.
- Lia agado estas bona. - His work is good.
- Tuj venis reagoj pri mia propono. - There were immediate reactions to my proposal.

akcepti (tr) - to accept

- Ĉu vi akceptos la proponon? - Will you accept the proposal?
- Iru al la akceptejo. - Go to the lobby.
- Mi malakceptas tiun konduton. - I reject that behaviour.

akvo - water

- Mi ŝatas trinki akvon. - I like to drink water.
- Vidu, kia belega akvofalo! - Look, what a beautiful waterfall!
- La melono estas tre akveca. - The melon is very watery.
- Ĉu vi povus akvumi la florojn? - Could you water the flowers?

al - to

- Baldaŭ mi iros al la urbo. - Soon I'll go to the city.

- La trajno alvenos post 5 minutoj. - The train will arrive in five minutes.
- Ĉu vi jam aliĝis al la seminario? - Have you already signed up for the seminar?

alia - other

- Ĉu iu havas alian ideon? - Does anyone have another idea?
- La aliaj jam foriris. - The others have already left.
- Venu tuj, alie ni malfruos. - Come right away; otherwise we'll be late.
- Aliflanke, ĝi estas iom multekosta. - On the other hand, it's somewhat expensive.

alta - high, tall

- Ŝia ĉevalo estas tre alta. - Her horse is very tall.
- La suko staras malalte en la fridujo. - The sugar is down low in the fridge.
- Li kantas tre altnivele. - He sings at a very high level.

ami (tr) - to love

- Mi amas ilin. - I love him.
- Plej gravas nia amo. - Most important is our love.
- Ŝi ame rigardis lin. - She looked at him lovingly.

amiko - friend

- Miaj amikoj ne povos veni ĉi-vespere. - My friends can't come this evening.
- Ili estas koramikoj. - They are girlfriend and boyfriend.
- Somere mi multe amikumis. - In the summer I hung out with friends a lot.
- Amike salutas, Petro - With friendly greetings, Peter

ankaŭ - also, too

- Ankaŭ mi sukcesis. - I succeeded also.
- Li ankaŭ ŝatus vojaĝi al Japanio. - He'd also like to travel to Japan.
- Ankaŭ li ŝatus vojaĝi al Japanio. - He too would like to travel to Japan.

ankoraŭ - still, yet

- Ĉu vi ankoraŭ ne estas hejme? - Are you still not home?
- Mi ne konas ilin ankoraŭ. - I don't know them yet.
- Provu ankoraŭ unu fojon. - Try yet another time.

antaŭ - before

- Antaŭ la domo staras aŭto. - In front of the house is a car.
- Antaŭe mi ne ŝatis fromaĝon. - I didn't like cheese before.
- Mia antaŭa telefono ĉesis funkcii. - My old phone stopped working.
- Ĉiam antaŭen! - Always onwards!

aperi (ntr) - to appear

- Aperis interesa libro pri arto januare. - An interesting book about art came out in January.

- Gerda malaperis! - Gerda disappeared!
- Ili aperigas novaĵojn regule. - They put out news regularly.

apud - next to

- Apud mi sidas du katoj. - Two cats are sitting next to me.
- Ŝi loĝas en apuda domo. - She lives next door.
- Li staras apude. - He stands beside.

arto - art

- Mi multe interesiĝas pri artu. - I'm very interesting in art.
- Ŝi estas fama artisto. - She is a famous artist.
- Esperanto estas artefarita lingvo. - Esperanto is an artificial language.

atendi (tr) - to wait

- Atendu iom, baldaŭ estos via vico. - Wait a bit; soon it'll be your turn.
- Ĉu vi atendas iun? - Are you waiting for someone?
- Ni povas atendi en la atendejo. - We can wait in the waiting room.
- Tute neatendite ili gajnis la ludon. - They won the game completely unexpectedly.

aŭ - or

- Ĉu vi volas akvon aŭ sukron? - Do you want water or juice?
- Mi venos morgaŭ aŭ postmorgaŭ. - I will come tomorrow or the day after.
- Vi devas aŭ pagi por ĝi aŭ ripari ĝin. - You have to either pay for it or fix it.

aŭdi (tr) - to hear

- Ĉu vi aŭdas la birdokantadon? - Do you hear the birds singing?
- Mi aŭdis ke ili disiĝis. - I heard that they've separated.
- Lia aŭdkapablo estas iom malbona. - His hearing is somewhat poor.

aŭskulti (tr) - to listen

- Aŭskultu atenteme kion mi diras. - Listen carefully to what I say.
- Ŝi ne volis aŭskulti miajn konsilojn. - She didn't want to listen to my advice.
- Uzu kapaŭskultilojn, mi petas. - Please use headphones.

aŭto - car

- Mi ne havas aŭton. - I don't have a car.
- Ili vojaĝos peraŭte. - They will go by car.

baldaŭ - soon

- Li venos baldaŭ. - He's coming soon.

bela - beautiful

- Vidu, kiaj belaj floroj! - Look; what beautiful flowers!
- Mi pensas ke ĝi estas malbela. - I think it's ugly.

- Ĉiutage vi pli kaj pli beliĝas. - You get more and more beautiful every day.
- Kiel ni povus beligi la paĝaron? - How could we improve the look of the site?

bezoni (tr) - to need

- Ĉu vi bezonas helpon? - Do you need help?
- Iliaj bezonoj estas grandegaj. - Their needs are immense.
- Mono ne bezonatas en tiu ĉi projekto. - Money is not needed for this project.

bildo - picture

- Ŝi kreis belan bildon. - She created a beautiful picture.
- Li tre ŝatas montri siajn lumbildojn. - He really likes to show his slides.
- Bildigu al vi scenon kun ridanta kato. - Imagine a scene with a laughing cat.

bona - good

- Tiu filmo estas tre bona. - That movie is very good.
- Ĉu vi bone fartas? - Are you doing well?
- Kia malbona stilo! - What bad style!

celi (tr) - to aim

- Kion vi celas? - What are you aiming for?
- La vojo estas la celo. - The path is the goal.
- La celgrupo estas studentoj. - The target group is students.

cent - hundred

- Ŝi vivis dum pli ol cent jaroj. - She lived over a hundred years.
- En la jaro mil okcent okdek sep. - In the year 1887.
- Tiu solvo estas centoble pli bona. - That solution is a hundred times better.

certa - certain

- Ĉu vi estas certa pri tio? - Are you sure about that?
- Li impresis iom malcerta pri si mem. - He seemed a little uncertain of himself.
- Tutcerte ni gajnos la ludon. - No doubt we'll win the game.

ĉambro - room

- Mi ŝatus lui ĉambron en la urbo. - I'd like to rent a room in the city.
- En nia domo estas kvar ĉambroj. - In our house are four rooms.

ĉar - because

- Mi ne venos, ĉar mi devos labori. - I'm not coming because I have to work.
- Kial vi laboras? Ĉar mi volas. - Why are you working? Because I want to.

ĉe - at

- Ili daŭre loĝas ĉe siaj gepatroj. - They still live with their parents.
- Ĉu vi ĉeestos la kunsidon? - Will you be at the meeting?

ĉefa - main

- La ĉefa problemo estas solvita. - The main problem is solved.
- Tokio estas la ĉefurbo de Japanio. - Tokyo is the capital of Japan.
- Ŝi manĝas ĉefe legomojn. - She eats mainly vegetables.

ĉi - this

- Ĉi tie mi loĝas. - Here's where I live.
- Ĉi-somere ni vojaĝos al la maro. - This summer we're taking a trip to the sea.
- Tiu ĉi biciklo estas mia. - That bicycle is mine.

ĉia - every kind

- Ĉiaj ideoj estas bonvenaj. - All kinds of ideas are welcome.
- Ĉiaspecaj legomoj uzeblas en la supo. - All kinds of vegetables can be used in the soup.
- Ĉiaokaze ne gravas, ĉar mi ne iros. - In any event, it's not important since I'm not going.

ĉiam - always

- Ŝi preskaŭ ĉiam malfruas. - She's almost always late.
- Mi ĉiam revis pri mondpaco. - I've always dreamt of world peace.

ĉie - everywhere

- En arbaro estas arboj preskaŭ ĉie. - In the forest there are trees almost everywhere.

ĉio - everything

- Ni devas pensi pri ĉio. - We have to think of everything.
- Ŝi havas ĉion, mi havas nenion. - She has everything; I have nothing.
- Apud mia strato estas ĉiovendejo. - Next to my street is a department store.

ĉiu - every

- Ĉiu infano havu egalan ŝancon. - Every child should have an equal chance.
- Mi konas ĉiujn ĉi tie. - I know everyone here.
- Ĉiuokaze mi ne povas naĝi. - I can't swim anyway.

ĉu - whether

- Ĉu vi amas min? - Do you love me?
- Ĉu esti aŭ ne esti? - To be or not to be?
- Vi venos morgaŭ, ĉu ne? - You're coming tomorrow, right?

da - of

- Kiom da jaroj vi havas? - How old are you?
- Aĉetu du litrojn da lakto. - Buy two litres of milk.
- Mi havas tro da problemoj. - I have too many problems.

danki (tr) - to thank

- Mi dankas vin! - I thank you!
- Koran dankon! - Heartfelt thanks!
- Ne dankinde! - Don't mention it!

daŭri (ntr) - to continue

- Kiom longe daŭros la leciono? - How long will the lesson take?
- Ĝi daŭros du horojn. - It lasts two hours.
- Daŭrigu la laboron la tutan tagon. - Continue the work all day.

de - of, from

- De kie vi venas? - Where do you come from?
- La hundo de Karlo forkuris. - Charles' dog ran away.
- Ekde la komenco ni pravis. - From the beginning we were right.

decidi (tr) - to decide

- Ŝi volas ĉion decidi. - She wants to decide everything.
- Atendas nun tre grava decido. - A very important decision is now waiting.
- Mi ne estas tre decidema. - I'm not very decisive.

dek - ten

- Kalkulu ĝis dek, se vi povas. - Count to ten if you can.
- Li mortis kiam li havis tridek tri jarojn. - He died when he was 30 years old.
- Ili estas ankoraŭ dekkelkjaruloj. - They're still teenagers.

dekstra - right

- La dekstra mano havas vundon. - The right hand is wounded.
- Ĉi tie vi veturu maldekstren. - Turn left here.
- Ĉu vi estas dekstrulo aŭ maldekstrulo? - Are you right-handed or left-handed?

demandi (tr) - to ask

- Morgaŭ mi demandos lin pri tio. - Tomorrow I'll ask him about that.
- Ne ekzistas malbonaj demandoj. - There's no such thing as a bad question.
- Bonvolu plenigi la demandaron. - Please fill out the questionnaire.

devi (tr) - must

- Vi devas diri la veron. - You have to tell the truth.
- Estas mia devo demandi vin pri tio. - It's my duty to ask you about that.
- Ŝi devigis nin kanti. - She forced us to sing.

deziri (tr) - to desire

- Ĉu vi deziras diri kelkajn vortojn? - Would you like to say a few words?
- Mi deziras ĉion bonan al vi. - I wish you all the best.
- Kio estas via deziro? - What is your wish?

dika - thick

- Lia lasta libro estas tre dika. - His last book was very thick.
- Mi ŝatus iom maldikiĝi ĝis la somero. - I'd like to lose some weight by summer.
- Troa manĝado dikigis min. - Too much eating made me fat.

direkti (tr) - to direct

- Direktu vian atenton al mi. - Direct your attention to me.
- Kiun direkton ni prenu? - Which direction should we take?

diri (tr) - to say

- Kion diri? - What to say?
- Laŭdire ŝi estos en la nova estro. - I heard she'll be on the new board.
- Dirite kaj farite. - Said and done.

diversa - diverse

- Ekzistas multaj diversaj manieroj pensi. - There are many different ways of thinking.
- Lingva diverseco estas tre grava. - Language diversity is very important.

do - so

- Do, ni povas iri hejmen nun. - So, we can go home now.
- Tio do signifas ke estas espero. - So that means there's hope.

dolĉa - sweet

- Vi estas tre dolĉa. - You are very sweet.
- Tiu suko estas iom maldolĉa. - That juice is a bit sour.
- Dolĉigu ĝin per sukero. - Sweeten it with sugar.
- La bebo tre dolĉe ridetis al mi. - The baby very sweetly smiled at me.

domo - house

- Ni ŝatus aĉeti domon ĉi-jare. - We'd like to buy a house this year.
- Havi ĉe-maran dometon estas mia revo. - To have a cottage by the sea is my dream.
- En la stacidomo estis multaj homoj. - There are many people in the station.

doni (tr) - to give

- Donu al mi la salon, mi petas. - Please pass me the salt.
- Mi ŝatus aldoni unu aferon. - I'd like to add one thing.
- Li fordonis ĉiun sian monon. - He gave away all his money.

dormi (ntr) - to sleep

- Ili dormis la tutan nokton. - They slept all night.
- Ŝi estas tre dormema matene. - She is very sleepy in the morning.
- Mi havis problemon endormiĝi hieraŭ. - I had trouble getting to sleep yesterday.

du - two

- Post du horoj mi forvojaĝos per trajno. - In two hours I'm leaving by train.
- La bileto estas duoble pli kosta ĉi tie. - The ticket costs twice as much here.
- Ni devos duonigi la elspezojn ĉi-jare. - We will have to half expenses this year.

dum - while

- Dum naŭ jaroj mi ludis pianon. - I've played piano for nine years.
- Vi kuros, ĉu? Dume mi iom ripozos. - You're going for a run? I'll relax in the meantime.

eĉ - even

- Eĉ mi povus tion fari. - Even I could do that.
- Ŝi eĉ ne volis gustumi la panon. - She didn't even want to try the bread.

edzo - husband

- Ŝia edzo subite mortis antaŭ tri jaroj. - Her husband died suddenly three years ago.
- Mi multe amas mian edzinon. - I love my wife a lot.
- Ni planas geedziĝi venontjare. - We're planning to get married next year.

ekster - outside

- Li atendas ekster la vendejo. - He's waiting outside the store.
- Ŝi kuris eksteren. - She ran outside.
- Ŝi kuras ekstere. - She ran outside.
- Tiu libro estas eksterordinare bona. - That book is extraordinarily good.

ekzemplo - example

- Ĉu vi povas doni kelkajn ekzemplojn? - Can you give some examples?
- Mi ne konas ĉiujn, ekzemple lin. - I don't know everyone: him, for instance.

ekzisti (ntr) - to exist

- Mi pensas, do mi ekzistas. - I think, therefore I am.
- Socio ne povus ekzisti sen leĝoj. - Society could not exist without laws.

el - out

- Ŝi eliris el la buso. - She got off the bus.
- Mi elpensis novan planon. - I came up with a new plan.
- Mi ne eltenas pli nun. - I can't take anymore now.

en - in

- Ili loĝas en apartamento. - They live in an apartment.
- Eniru, mi petas. - Come in, please.
- Verŝu lakton en la glason, mi petas. - Please pour milk in the glass.

esperi (x) - to hope

- *Ŝi esperas, ke ŝi sukcesos hodiaŭ.* - She hopes she'll succeed today.
- *Mi tute perdis la esperon pri li.* - I've lost all hope for him.
- *Espereble bone funkcios morgaŭ.* - Hopefully it will work well tomorrow.

esti (ntr) - to be

- *Vi estas mia plej bona amiko.* - You're my best friend.
- *Ĉu ekzistas spiritaj estuloj?* - Is there such thing as ghosts?
- *Esperanto apartenas al la estonteco.* - Esperanto belongs to the future.

facila - easy

- *La ekzameno estis tre facila.* - The exam was very easy.
- *Li facile trovis ilin.* - He easily found them.
- *Malfacilaĵoj povas esti lacigaj.* - Difficulties can be tiring.
- *Tio multe faciligos la laboron.* - That will greatly facilitate the work.

fako - compartment, department

- *Tiu ŝranko havas multajn fakojn.* - That cupboard has many compartments.
- *Matematiko ne estas mia fako.* - Mathematics isn't my department.
- *Ŝi estas fakulo pri libroj.* - She's an expert on books.

fakto - fact

- *Esperanto vivas, tio estas fakto.* - Esperanto lives; that's a fact.
- *Mi fakte ne scias kiel fari tion.* - I actually don't know how to do that.
- *Faktoj fakte mankas por tion pruvi.* - In fact, there are no facts to prove that.

fali (ntr) - to fall

- *Ŝi falis de la seĝo.* - She fell from the chair.
- *Kiu faligis la vazon?* - Who knocked down the vase?
- *Ĝi estas malnova, ĝi preskaŭ disfalas.* - It's old; it's almost falling apart.

familio - family

- *En mia familio estas 5 personoj.* - There are five people in my family.
- *Mia familia nomo estas Lee.* - My last name is Lee.
- *Parto de lia prafamilio loĝis en Ĉinio.* - Some of his ancestors lived in China.

fari (tr) - to do, to make

- *Kion vi faras?* - What are you doing?
- *Kio vi ŝatus fariĝi?* - What would you like to be?
- *Mi pensas ke tio ne fareblas.* - I think that can't be done.

feliĉa - happy

- *Hodiaŭ mi estas tre feliĉa.* - Today I'm very happy.
- *Feliĉe ŝi ne vundis sin.* - Happily she didn't hurt herself.

- Via reago malfeliĉigis min. - Your reaction upset me.

fenestro - window

- Rigardu tra la fenestro. - Look out the window.
- Ĉu vi povus lavi la fenestrojn morgaŭ? - Could you wash the windows tomorrow?

fermi (tr) - close

- Fermu la pordon, mi petas. - Close the door, please.
- Ŝi malfermis la libron kaj eklegis. - She opened the book and started reading.
- Tiu pordo aŭtomate malfermiĝas. - That door opens automatically.
- La plej proksima vendejo estas fermita. - The nearest store is closed.

filo - son

- Ni havas du filinojn kaj unu filon. - We have two daughters and one son.
- Ŝi estas mia bofilino. - She's my daughter-in-law.

fini (tr) - to finish

- Mi finos la laboron kaj iros hejmen. - I'll finish the work and go home.
- Kiam finiĝos la leciono? - When is the lesson over?
- La fino de la filmo estis tre bona. - The end of the movie was very good.
- Finfine vi komprenas kion mi celis. - Finally you understand what I was getting at.

flanko - side

- Sur mia dekstra flanko sidas neniu. - There's no one sitting on my right.
- Tio estas tute flanka afero. - That's really beside the point.
- Miaflanke ne estas pliaj demandoj. - As far as I'm concerned, there are no more questions.

flugi (ntr) - to fly

- Morgaŭ ni flugos al Brazilo. - Tomorrow we're flying to Brazil.
- Bonŝance la vespo forflugis. - Luckily the wasp flew away.
- Flugiloj de facila vento. - Wings of an easy wind.

fojo - time, occasion

- Kiom da fojoj vi estis en Afriko? - How many times have you been to Africa?
- Kelkfoje li mensogas. - Sometimes he lies.
- Ĉu vi scias kion ili foje diris al mi? - Do you know what they once told me?

for - away

- Ĉiu espero ankoraŭ ne estas for. - All hope isn't yet lost.
- Forigu ĉion de la tablo tuj. - Get everything off the table immediately.
- Kial vi volas forveturi jam morgaŭ? - Why do you want to head out tomorrow already?

forgesi (tr) - to forget

- Mi preskaŭ ĉion forgesis. - I forgot almost everything.
- Eble vi forgesis ĝin hejme. - Maybe you forgot it at home.
- Kia neforgesebla golo! - What an unforgettable goal!

forta - strong

- Pippi estas la plej forta en la mondo. - Pippi is the strongest in the world.
- Hieraŭ mi batis mian kapon forte. - Yesterday I hit my head hard.
- La malsano malfortigis lin multe. - The illness really weakened him.

foto - photo

- En la libro estas multaj belaj fotoj. - There are many beautiful photos in the book.
- Ĉu mi rajtas foti vin? - May I take your picture?
- Kelkfoje mi laboris kiel fotisto. - Sometimes I've worked as a photographer.

frato - brother

- Mi havas kaj fraton kaj fratinojn. - I have both a brother and a sister.
- Ŝi havas tri gefratojn. - She has three siblings.
- Via frateto ekploris subite.
suddenly. - Your little brother suddenly started crying.

frua - early

- En la frua mateno ŝi naskiĝis. - She was born in the early morning.
- Tiu horloĝo iras iom tro frue. - That clock runs a little slow.
- Ĉu li malfruas denove? - Is he late again?

funkcii (ntr) - to function

- Lia komputilo ne plu funkcias bone. - His computer doesn't work well anymore.
- Ŝi funkcias kiel urbestro. - She serves as mayor.
- $f(x) = x$ estas matematika funkcio. - $f(x) = x$ is a mathematic function.

glaso - glass

- La glaso estas tute malplena. - The glass is completely empty.
- Ĉu vi ŝatus glason da akvo? - Would you like a glass of water?

granda - big

- La hundo estas pli granda ol la kato. - The dog is bigger than the cat.
- Estus bone iom malgrandigi la foton. - It would be good to shrink the photo a bit.
- Niaj scioj grandiĝas ĉiujare. - Our knowledge grows every year.

grava - important

- Ĝi ne estas grava, ĝi estas malgrava. - It's not important; it's trivial.
- Ĉu tio vere gravas? - Is that really important?
- Li konas plurajn gravulojn ĉi tie. - He knows several important people there.

grupo - group

- Grupo da infanoj kuris sur la herbejo. - A group of kids ran on the grass.
- La instruisto grupigis la lernantojn. - The teacher assembled the students.
- Mi ŝategas tiun muzikgrupon. - I love that band.

ĝenerala - general

- Mi havas iujn ĝeneralajn komentojn. - I have some general comments.
- Ĝenerale mi konsentas kun vi. - In general I agree with you.
- Mi pensas ke vi tro ĝeneraligas. - I think you're overgeneralising.

ĝi - it

- Mi havas hundon, ĝi nomiĝas Fido. - I have a dog; its name is Fido.
- Mi aŭdas trajnon, ĉu vi vidas ĝin? - I hear a train; do you see it?
- Lia ĉevalo vundiĝis, ĝia piedo doloras. - His horse is wounded; its hoof hurts.

ĝis - until

- Li kuris ĝis la lago kaj poste reen. - He ran as far as the lake and then back again.
- Ĝis kiam vi laboros ĉi-vespere? - Until when are you working tonight?
- Ĝis morgaŭ! - Until tomorrow!

ĝusta - right

- Mi sentas ke ŝi estas la ĝusta por mi. - I feel she's the right one for me.
- Venu ĝustatempe, mi petas. - Please arrive on time.
- Ĝuste tiel ankaŭ ili faris. - That's exactly how they did it too.

havi (tr) - to have

- Ĉu vi havos tempon morgaŭ? - Will you have time tomorrow?
- Kiam mi estis juna mi havis biciklon. - When I was young I had a bicycle.
- Kiom da jaroj vi havas? - How old are you?

hejmo - home

- Mia hejmo ne estas granda. - My home isn't big.
- Li laboras hejme hodiaŭ. - He's working at home today.
- Ĉu ni iru hejmen? - Should we go home?

helpi (tr) - to help

- Ili multe helpis al mi. - They helped me a lot.
- Helpu min, mi petas. - Please help me.
- Li ĉiam estas tre helpema. - He's always very helpful.

hieraŭ - yesterday

- Hieraŭ ili havis liberan tagon. - Yesterday they had the day off.
- La hieraŭa manĝaĵo ne plu estas freŝa. - Yesterday's food was no longer fresh.

historio - history

- La historio de la homaro estas interesa. - The history of mankind is interesting.
- Ŝi rakontis nekredeblan historion al mi. - She told me an incredible story.
- Tiu ĉi momento estas historia. - This moment is historical.

hodiaŭ - today

- Hodiaŭ la suno brilas. - Today the sun is shining.
- La hodiaŭaj junuloj estas pigraj. - Young people today are lazy.

homo - human

- Kiom da homoj venis hieraŭ? - How many people came yesterday?
- La homaj rajtoj estas tre gravaj. - Human rights are very important.
- Eble iam la homaro vivos en paco. - Perhaps someday mankind will live in peace.

horo - hour

- Kioma horo estas? - What time is it?
- Estas la tria horo kaj tridek minutoj. - It's 3:30.
- Mi havas horaron de la urbaj busoj. - I have a schedule for the city buses.
- La salajro estas 20 dolaroj hore. - The salary is 20 dollars an hour.

ia - some kind

- Ia ajn ideo estas bonvena. - Any sort of idea is welcome.
- Iamaniere ili pravas. - In some way they're right.
- Ĉu vi havas ian kovrilon en la aŭto? - Do you have some kind of cover in the car?

ial - for some reason

- Ial la programo ne funkcias nun. - For some reason the program doesn't work now.

iam - sometime

- Iam vi devus viziti min. - Sometime you should visit me.
- Ĝis iam ie! - Till sometime somewhere!

ideo - idea

- Li kelkfoje havas tre bonajn ideojn. - He sometimes has very good ideas.
- La ideo mondo estas eterna. - The world of ideas is eternal.
- Karaj samideanoj, ... - Dear comrades, ...

ie - somewhere

- Ie mi forgesis mian ombrelon. - I forgot my umbrella somewhere.
- Ili loĝas ie en la suda parto de la urbo. - They live somewhere in the south end of town.

iel - somehow

- Iel ŝi sukcesis konvinki lin kuniri. - Somehow she managed to convince him to come along.

- Iel ajn, mi pensas ke ŝi mensogas. - Anyhow, I think she's lying.

ili - they

- Ili venas el alia lando. - They come from abroad.
- Ilia stilo tre plaĉas al mi. - I really like their style.

infano - child

- Ili havas du malgrandajn infanojn. - They have two small children.
- Ŝi ofte agas tre infanece. - She often acts very childishly.
- Mia infano ne ŝatas sian infanejon. - My child doesn't like his daycare.

informi (tr) - to inform

- Li informis nin pri la katastrofo hieraŭ. - He informed us of the disaster yesterday.
- Iru al la informejo de la hotelo. - Go to the hotel's information desk.
- Tiu teksto ne estas tre informa. - That text isn't very informative.

instrui (tr) - to teach

- Ŝi instruas fizikon en meza lernejo. - She teaches physics in middle school.
- La junuloj ŝatas sian instruiston. - The kids like their teacher.
- Ĉu vi estas instruema? - Do you like to teach?

inter - between

- Estus bone se vi sidus inter ili. - It would be good if you sat between them.
- Mi ŝatus vojaĝi interalie al Moskvo. - I'd like to go to Moscow for one.
- Tre gravas trovi interkonsentojn. - It's very important to find consent.

inviti (tr) - to invite

- Mi volas inviti ĉiujn miajn amikojn. - I want to invite all my friends.
- Ĉu ankaŭ vi estas invitita al la festo? - Are you invited to the party too?
- Jes, mi ĵus ricevis la invitilon. - Yes, I just got the invitation.

io - something

- Io tia povus funkcii. - Something like that could work.
- Mi ne trovis ion en via dorsosako. - I didn't find anything in your backpack.
- Ĉi tie vi povas skribi ion ajn. - Here you can write anything.

iom - somewhat

- Li iom pentas ke li ne kuniris. - He somewhat regrets not going along.
- Ili nur iomete ridis. - They laughed just a bit.
- Ĉu vi volas iom pli da glaciaĵo? - Would you like some more ice cream?

iri (ntr) - to go

- Ni verŝajne iros al la urbo poste. - We will probably go to the city afterwards.
- Ĉu vi piediros al la vendejo? - Are you going to walk to the store?

- Mi ne scias kie estas la elirejo. - I don't know where the exit is.

iu - someone

- Ĉu iu serĉis min lastatempe? - Was someone looking for me recently?
- Iufoje mi ŝatus krii al ili. - Sometimes I'd like to yell at them.
- Ne iu ajn povas tion fari. - Not just anyone can do that.

jam - already

- Ŝi jam manĝis. - She already ate.
- Kiel longe vi estas jam kuracisto? - How long have you been a doctor already?
- Li jam kelkfoje demandis pri vi. - He's already asked about you a few times.

jaro - year

- Kiom da jaroj li havas? - How old is he?
- Ĉi-jare ŝi festos sian 50-jaran jubileon. - This year she will celebrate her 50th anniversary.
- Mi certe ne iros al la jarkunveno. - I'm definitely not going to the annual conference.

je - at, in, by

- Je kioma horo ili venos? - What time are they coming?
- La trajno foriros je la tria horo. - The train departs at three o'clock.
- Ĉu vi kredas je Dio? - Do you believe in God?

jen - here

- Jen nia mondo. - This is our world.
- Jen mi finfine. - Here I am finally.
- Jen donaco por vi. - Here's a gift for you.

jes - yes

- Jes, vi pravas. - Yes, you are right.
- Ŝi respondis jese al nia demando. - She answered "yes" to our question.
- Li estis silenta kaj nur kapjesis. - He was silent and only nodded. [made a "yes" with his head]

juna - young

- Vi estas ankoraŭ tre juna. - You are still very young.
- Pluraj maljunuloj ridis laŭte. - Several old people laughed loudly.
- Mi multe maljuniĝis dum la lastaj jaroj. - I have aged much during the last few years.

ĵeti (tr) – to throw

- Ĵetu la pilkon al mi. - Throw the ball to me.
- Li forĵetis sian malnovan komputilon. - He threw away his old computer.
- Ŝi ĵetis la ĵetkubon kaj ricevis kvinon. - She threw the dice and got a five.

kaj – and

- Li kaj ŝi amas unu la alian. - He and she love one another.
- Mi kaj volas kaj ne volas. - I both want and don't want.
- Kaj mi kaj ŝi volas gajni la konkurson. - Both she and I want to win the competition.

kampo - field

- Sur la kampo kreskas multaj floroj. - Many flowers are growing on the field.
- Biologio ne estas mia kampo. - Biology is not my field.
- Kamparanoj kutime loĝas en vilaĝetoj. - Country [field group] people usually live in small villages.

kanti (tr) – to sing

- Kantu alian kanton, mi petas. - Sing another song, please.
- Ili ŝatas kantadi dum horoj. - They like to keep singing for hours.
- Ŝi fajfis kaj li kantetis por si mem. - She whistled and he sang softly for themselves.

kapti (tr) – to catch

- Kaptu min se vi povas! - Catch me if you can!
- Baldaŭ la ŝtelistoj estos kaptitaj. - Soon the thieves will be caught.
- Ĉu vi ĉion kaptis de la filmo? - Did you understand [catch] everything in the film?

kara - dear

- Karaj amikoj, sentu vin kiel hejme. - Dear friends, make [feel] yourself at home.
- Antaŭ tri jaroj mortis mia kara avino. - Three years ago, my dear grandmother died.
- Kara mia, kial vi ne venis al mi pli frue? - My dear, why didn't you come to me earlier?

kaŝi (tr) – to hide

- Li kaŝis ĝin ie kaj nun ne povas retrovi ĝin. - He hid it somewhere and now can't find it again.
- Ili malkaŝis la sekreton al mi. - They revealed the secret to me.
- Mi kaŝe aŭskultis kion ili diris. - I secretly listened to what they said.

ke - that

- Mi pensas ke vi malpravas pri tio. - I think that you are wrong about that.
- Tre bone ke vi venis nun. - It's very good that you've come now.
- Mi imagas ke eblas rapide aranĝi tion. - I imagine it would be possible to arrange that quickly.

kelka - some

- Kelkaj pensas ke li kaŝis la monon. - Some think that he hid the money.
- Bonvolu doni al mi kelkajn paperojn. - Please give me some papers.
- Kelkfoje mi ne scias kion pensi pri ŝi. - Sometimes I don't know what to think about her.

kia - what sort, what kind, what a ...

- Kia belega kaj bongustega torto! - What a beautiful and delicious pie!
- Kia estas la supo? Tre bongusta. - How is the soup? Very tasty.
- Kia patro, tia filo. - Like father, like son.

kial – why, for what reason

- Kial vi demandas? Ĉar mi scivolas. - Why do you ask? Because I want to know.
- Nu, bone. Kial ne. - Well, ok. Why not.
- Ekzistas multaj kialoj por tio. - There are many reasons for that.

kiam – when, at what time

- Kiam komenciĝos la kurso? - When will the course begin?
- Li brakumis min kiam mi alvenis. - He hugged me when I arrived.

kie – where, in what place

- Kie vi estas? Mi estas hejme. - Where are you? I am at home.
- Kien vi iros? Mi iros hejmen. - Where are you going? I am going home.
- Mi nun estas tie, kie vi estis hieraŭ. - I am now at the place where you were yesterday.

kiel – how, in what way

- Kiel vi fartas? Mi fartas tre bone. - How are you doing? I am doing very well.
- Kiel funkcias tiu programo? - How does that program work?
- Ni elektis ŝin kiel prezidanton. - We elected her as president.

kies - whose

- Kies ĉemizon vi havas hodiaŭ? - Whose shirt do you have today?
- Kies estas tiu hundo? - Whose is that dog?

kio - what

- Kio estas tio? - What is that?
- Kion vi volas? - What do you want?
- Ĉu vi vidis kion ili faras? - Did you see what they did?

kiom – how much, how many

- Kiom kostas la pomoj? - How much do the apples cost?
- Kiom da mono vi havas? - How much money do you have?
- Mi volas tiom kiom vi havas. - I want as many as you have.

kiu – who, which

- Kiu vi estas? - Who are you?
- Tiu kiu kantas estas mia fratino. - The one who is singing is my sister.
- Kiun daton ni havas hodiaŭ? - What date is it today?

klara - clear

- La akvo estas tre klara en tiu ĉi maro. - The water is very clear in this sea.
- Ĉu vi povas klarigi al mi la problemon? - Can you explain [clarify] the problem to me?
- Mia opinio via demando estas malklara. - In my opinion, your question is unclear.

knabo – boy

- La knaboj kaj la knabinoj ludas kune. - The boys and the girls are playing together.
- Ĉu vi estas mia granda knabeto? - Are you my big little boy?

koloro - colour

- Flava estas mia plej ŝatata koloro. - Yellow is my favourite colour.
- La ĉielarko estas multkolora. - The rainbow is multicoloured.
- Li kolorigis sian hararon blua. - He coloured his hair blue.

komenci (tr) – to begin

- Morgaŭ mi komencos novan kurson. - Tomorrow I will begin a new course.
- Hieraŭ komenciĝis mia ferio. - Yesterday my holiday/vacation began.
- Mi estas komencanto. - I am a beginner.

kompreni (tr) – to understand

- Mi ne komprenas ĉion. - I don't understand everything.
- Kompreneble ni sukcesos. - Of course [understandably] we will succeed.
- Ili estas tre komprenemaj. - They are very understanding.

koni (tr) – to know [a person], to be familiar with

- Ĉu vi konas ŝin? - Do you know her?
- Tiu kanto estas tre konata mialande. - That song is very well-known in my country.
- Mi konatiĝis kun ili antaŭ du jaroj. - I became acquainted with them two years ago.

konsenti (x) – to agree

- Ĉu vi konsentas? - Do you agree?
- La komitato konsentis respondeci. - The committee agreed to be responsible.
- Ili ĵus trovis interkonsenton. - They have just come to an agreement.

kontenta – content, pleased

- Nun mi estas tre kontenta. - Now I am very content.
- Kial vi ĉiam estas malkontenta? - Why are you always displeased?
- Kelkfoje estas facile kontentigi infanon. - Sometimes it is easy to appease children.

kontraŭ – against

- Ne ekzistas medikamento kontraŭ tio. - No medication against that exists.
- Mi estas kontraŭ tiu propono. - I am against that proposal.
- Ŝi provis kontraŭlabori nin tutan tagon. - She tried to work against us for the whole day.

kosti (tr) – to cost

- La pomoj kostas dek eŭrojn. - The apples cost ten euros.
- Nia domo estis malmultekosta. - Our house was very inexpensive.
- La kostoj estas iom tro altaj. - The costs are a little too high.

kredi (tr) – to believe

- Mi kredas vin. - I believe you.
- Ĉu vi kredas je Dio? - Do you believe in God?
- Al preĝejo iras ĉefe kredantoj. - It's mainly believers who go to church.

krom – aside from, except

- Krom tio, ĉio estas en ordo. - Except for that, everything was in order.
- Ĉiuj venis krom vi. - Everyone came except you.
- Krome mi opinias ke ni devus pagi pli. - In addition, I think that we should pay more.

kun - with

- Mi vojaĝos kun li per trajno al la urbo. - I will travel with him to the city by train.
- Ŝi estas mia kunloĝanto. - She is my roommate [with-dweller].
- Nia kunlaboro tre bone funkcias. - Our co-worker is working out very well.

kuŝi (ntr) – to lay in a place, to lay at rest

- Mi ŝatus kuŝi sur la lito kaj iom ripozi. - I like to lay on the bed and rest a bit.
- Kuŝigu la bebon sur la sofon. - Put the baby down on the sofa.
- Estas agrable kuŝadi sur la strando. - It is nice to lay out on the beach.

kvar - four

- Kvar fojojn mi frapis la pordon. - I knocked on the door four times.
- Ni iris kvarope al la festo. - A foursome of us went to the party.
- Dudek kvin elcentoj estas unu kvarono. - Twenty-five percent is one fourth.

labori (ntr) – to work

- Ĉu vi laboros venontsemajne? - Will you work next week?
- Li ne estas tre laborema. - He is not very hard-working.
- Kie troviĝas via laborejo? - Where is your workplace located?

lakto - milk

- Kelkaj ŝatas trinki lakton. - Some like to drink milk.
- Bovinoj donas multe da lakto. - Cows give much milk.
- La laktaĵoj prefere estu en la fridujo. - Dairy foods should preferably stay in the refrigerator.

lando – country, land

- De kiu lando vi venas? - Which country do you come from?
- Ĉu ni estas samlandanoj? - Are we countrymen?
- Mi ĵus transiris la landlimon. - I have just crossed the country's border.

larĝa - wide

- Mia pantalono estas iom tro larĝa. - My pants are a little too wide.
- La tunelo estas tro mallarĝa por busoj. - The tunnel is too narrow for busses.
- Bonus iom larĝigi la pordon, ĉu ne? - It'd be good to widen the door a little, wouldn't it?

lasi (tr) – to leave, to let

- Lasu min rakonti al vi kial tio ne eblas. - Let me tell you why that's not possible.
- Ni forlasis nian landon pasintjare. - We left behind our country last year.
- Ne lasu la telerojn fali. - Don't let the plates fall.

lasta - last

- Nun estas la lasta fojo, ke mi eliras. - Now is the last time that I'll go out.
- Ŝi venis lastminute al la konkurso. - She came at the last minute to the race.
- Lastatempe mi ne multe aŭdis pri li. - Recently I haven't heard much from him.

legi (tr) – to read

- Li lernis legi en la lernejo. - He learned how to read in school.
- Laŭtlege la poemon, mi petas. - Read the poem aloud, please.
- Ĉu vi ŝatas legi romanojn? - Do you like to read novels?

lerni (tr) – to learn

- Kiam vi lernis legi? - When did you learn to read?
- En mia lernejo estas multaj lernantoj. - In my school there are many students.
- Ŝi forgesis sian lernolibron hejme. - She forgot her textbook at home.

letero – letter (correspondence)

- Mi skribas longan leteron al li. - I wrote a long letter to him.
- Ĉu vi ŝatus esti mia leteramiko? - Would you like to be my penpal?
- Por skribi leteron oni uzas literojn. - To write a letter, one uses letters.

li – he, him

- Li ne ŝatas lin. - He doesn't like him.
- Lia amiko verkis bonan libron. - His friend wrote a good book.

libera - free

- Ĉiuj volas esti liberaj, ĉu ne? - Everyone wants to be free, right?
- Ŝi estis en malliberejo dum tri jaroj. - She was in jail for three years.
- Libereco, egaleco kaj frateco! - Freedom, equality, and brotherhood!

libro – book

- Mi ŝatas legi libron vespere. - I like to read a book in the evening.
- En tiu librovendejo mi neniam estis. - I have never been in that bookstore.
- Ĉu eldoni la gramatikon kiel libron? - Should we publish the grammar as a book?

lingvo - language

- En la mondo ekzistas multaj lingvoj. - In the world exist many languages.
- Ankaŭ lingva egaleco gravas. - Linguistic equality is also important.
- Esperantistoj kutime estas lingvemaj. - Esperantists are often interested in languages.

loko – place, location

- Ĉu apud vi estas libera loko? - Is there a free place next to you?
- Mi ne komprenas la lokan lingvon. - I don't understand the local language.
- Kie loki la librojn? - Where should we place the books?

longa - long

- La trajno estas tre longa. - The train is very long.
- Li nur mallonge parolis al la publiko. - He spoke to the public only briefly.
- Estus bone longigi la kurson je du tagoj. - It'd be good to lengthen the course by two days.

ludi (x) – to play

- Ŝi ludas kaj gitaron kaj violonon. - She plays both the guitar and the violin.
- Liaj katoj estas tre ludemaj. - His cats are very playful.
- En la nova ludejo ofte estas multaj infanoj. - There are often many children in the new playground.

manĝi (tr) – to eat

- Mi estas ege malsata kaj ŝatus manĝi tuj. - I'm very hungry and would like to eat right now.
- Venu, la vespermanĝo estas preta. - Come, supper is ready.
- La patro manĝigas sian infaneton. - The father fed his small child.

maniero – way, manner, method

- Eblas solvi tion en pluraj manieroj. - It is possible to solve that in several ways.

manki (ntr) – to be absent, to be lacking

- Ŝi multe mankas al mi. - I miss her a lot. [she is absent from me]
- Ĉu io mankas sur la tablo? - Is something missing on the table?
- Ĉiuj havas iun mankon. - Everyone has some kind of need.

mano - hand

- Preskaŭ ĉiuj havas du manojn. - Almost everyone has two hands.
- Li interesiĝas pri manlaboroj. - He is interested in handiwork.
- Eblas manĝi la kukon permane. - It is possible to eat the cake with your hands.

maro - sea

- Mi ŝatus loĝi apud la maro. - I would like to live by the sea.
- Mara akvo ofte estas sala. - Sea water is often salty.
- Kelkaj maristoj iĝis marmalsanaj. - Some sailors became seasick.

mateno - morning

- Bonan matenon! - Good morning!
- Kion vi volas matenmanĝi? - What do you want to eat for breakfast?
- Ŝi vekigis frue ĉi-matene. - She woke up early this morning.

mem – self, yourself, etc.

- Ĉu vi mem ŝatus tion fari? - Would you like to do that yourself?
- Li estas iom tro memfida. - He is a little too self-confident.
- Memkompreneble! - Obviously! [self-understandably!]

memori (tr) – to remember

- Ili diris ke ili ne memoras kio okazis. - They said that they don't remember what happened.
- Mia memoro estas sufiĉe bona. - My memory is fairly good.
- Memorigu min morgaŭ, mi petas. - Remind me tomorrow, please.

meti (tr) – to put

- Ŝi metis la manĝaĵon sur la tablon. - She put the food on the table.
- Kie mi metu la sakojn? - Where should I put the bags?
- Multaj vortoj estas kunmetaĵoj. - Many words are compound. [put-together]

mezo – middle, centre

- Mi estis en la mezo de ĉio. - I was in the middle of everything.
- Meze de la urbo troviĝas bela parko. - In the centre of the city there is a beautiful park.
- Li nun iras al la meza lernejo. - He is now going to the middle school.

mi – I, me

- Mi pensas ke vi pravas. - I think that you're right.
- Mia opinio tio estas bonega ideo. - In my opinion, that is a great idea.
- Laŭdire la mio estas eterna. - They say that the self is eternal.

mil - thousand

- La aŭto kostas pli ol mil dolarojn. - The car costs more than a thousand dollars.
- Ĝi estas miloble pli bona ol la aliaj. - It is a thousand times better than the others.
- En la jaro du mil dek mi estis senlabora. - In the year 2000 I was out of work.

milito - war

- Militoj estas teruraj aferoj. - Wars are terrible things.
- Dum la dua mondmilito multaj mortis. - During the second world war, many died.
- Ĉi tie ekzistas militistoj preskaŭ ĉie. - Here there are soldiers almost everywhere.

minuto - minute

- Nun estas dek tri minutoj post la dua. - It's now thirty minutes after two.
- Atendu minuton, mi petas. - Wait a moment, please.
- La minutmontrilo estas la plej longa. - The minute hand is the longest.

miri (ntr) – to be amazed, to marvel

- Mi ne miras ke tio okazis al vi. - I am not surprised that that happened to you.
- La novaĵo pri ili tre mirigis min. - The news about them really surprised me.
- Infanoj ofte estas ĉarmaj kaj mirindaj. - Children are often charming and wonderful.

monato - month

- Kiu monato estas nun? - Which month is it now?
- Kiom vi enspezas monate? - How much do you earn each month?
- Kion vi faris dum via mielmonato? - What did you do during your honeymoon [honey month]?

mondo - world

- Nia mondo estas komuna respondeco. - Our world is a communal responsibility.
- Li estas tre fama tutmonde. - He is very famous worldwide.
- Ŝi estas monda ĉampiono. - She is a world champion.

mono - money

- Kiom da mono estas en via monujo? - How much money is in your wallet?
- Li ŝajnas esti pli malpli senmona. - He seems to be more or less penniless [without money].
- Ŝi ŝatas kolekti malnovajn monerojn. - She likes to collect old coins [money pieces].

montri (tr) – to show

- Ĉu mi montru al vi kiel mi faris? - Should I show you how I did [it]?
- Sekvu la ŝildojn kaj la montrilojn. - Follow the signs and the directions.
- Montriĝis ke li trompis nin ĉiujn. - It was revealed that he fooled all of us.

morgaŭ - tomorrow

- Mi eble venos al vi morgaŭ. - I will possibly come to you tomorrow.
- Postmorgaŭ komenciĝos nova kurso. - The day after tomorrow a new course will begin.
- Mi preparas la morgaŭan prelegon. - I am preparing tomorrow's lecture.

morti (ntr) – to die

- Ni ĉiuj iam mortos. - We will all die sometime.
- La tertremo mortigis tridek ok homojn. - The earthquake killed thirty-eight people.
- Kiam mi alvenis ŝi jam estis morta. - When I arrived, she was already dead.

movi (tr) – to move [something]

- Ne movu la kapon, estu tute senmova. - Don't move your head, be totally immobile.
- Mi ŝatas kuri kaj moviĝi. - I like to run and move around.
- Faru malpli grandajn movojn se eblas. - Make fewer great movements if possible.

multa – much, many

- Mi havas multajn amikojn. - I have many friends.
- Malmulte da akvo restas en la botelo. - Little water remains in the bottle.
- La pilko estas multekosta kaj multkolora. - The ball is costly and multicoloured.

nacio - nation

- Esperanto ne apartenas al iu aparta nacio. - Esperanto doesn't belong to any particular nation.
- Unuiĝintaj Nacioj estas grava organizo. - The United Nations is an important organization.
- Internaciaj rilatoj iĝas pli kaj pli oftaj. - International relationships have become more

and more common.

naski (tr) – to give birth

- Ne ĉiuj virinoj povas naski bebon. - Not all women can give birth to a baby.
- Mi naskiĝis la 30-an de januaro. - I was born on the 30th of January.
- Ŝi estas trilingva denaske. - She has been trilingual since birth.

naturo - nature

- La naturo en ĉi tiu regiono estas belega. - The nature in this region is beautiful.
- Ŝia sinteno estas tute natura. - Her attitude is completely natural.
- La leporo estas nature timema. - The leopard is naturally timid.

naŭ - nine

- Naŭ estas pli ol ok kaj malpli ol dek. - Nine is more than eight and less than ten.
- La naŭa simfonio de Beethoven bonas. - Beethoven's ninth symphony is good.

ne – no, not

- Ĉu vi volas kuri kun mi? Ne, dankon! - Do you want to run with me? No, thank you!
- Mi ne neas, ke Esperanto estas facila. - I am not denying that Esperanto is easy.
- Via nea respondo mirigis min. - Your negative response amazed me.

necesa - necessary

- Aero estas necesa por povi spiri. - Air is necessary to be able to breathe.
- Por flugi necesas aviadilo. - For flying, an airplane is necessary.
- Kie troviĝas necesejo? - Where can the toilets [necessary place] be found?

nenia – no kind, no sort

- Nenia promeso ŝanĝos mian decidon. - No sort of promise will change my decision.
- Nenia floro havas tiel belan odoron. - No kind of flower has such a beautiful odour.

neniam – never, at no time

- Nur tiu ne eraras, kiu neniam faras ion. - The only one who never errs, is the one who never does anything.
- Neniam en mia vivo mi vidis balenon. - I have never seen a whale in my life.

nenie – nowhere, in no place

- Nenie mi havas propran domon. - I don't have my own house anywhere.
- Mi volas iri nenien. Mi volas resti ĉi tie. - I want to go nowhere. I want to stay here.

neniel – in no way

- Mi neniel povas kompreni tion. - I can't understand that in any way.
- Mi neniel malhelpos vin foriri. - I won't help you to go in any way.

nenio - nothing

- Li manĝis nenion. - He ate nothing.
- Nenio okazas en ĉi tiu vilaĝo. - Nothing happens in this village.
- Mi volas nenion ĝuste nun. - I want nothing right now.

neniu – no one, no individual

- En la ĉambro estis neniuj krom li. - In the room there was no one except him.
- Mi konas neniun en ĉi tiu urbo. - I know no one in this city.

ni – we, us

- Vi kaj mi estas pretaj. Ni ekiru! - You and I are ready. Let's get going!
- Ni vespermanĝis kune. - We ate together.

nokto - night

- La nokto sekvas la tagon. - Night follows day.
- Nokte malfacilas vidi pro la mallumo. - At night, it is difficult to see because of the dark.
- Nokta dormo estas necesa. - Nighttime sleep is necessary.

nomo - name

- Mia nomo estas Jozefo. - My name is Joseph.
- Mi nomas lin amiko. - I called [named] him a friend.
- Kiel vi nomiĝas? - What is your name? [how are you named?]

nova - new

- Mia aŭto estas tute nova. - My car is brand new [completely new].
- Mi laboras per malnova komputilo. - I am working using an old computer.
- En ĵurnaloj oni povas legi novaĵojn. - In newspapers you can read the news.

numero - number

- Li loĝas en ĉi tiu strato je la numero 2. - He lives in this street at number 2.
- Bonus nombri kaj numeri ĉiujn librojn. - It would be good to count and number all books.
- Diru al mi vian telefon-numeron. - Tell me your telephone number.

nun - now

- Hieraŭ pluvis, sed nun la suno brilas. - Yesterday it rained but now the sun is shining.
- Nun mi ne povas respondi. - I can't respond now.
- Ne nun, sed baldaŭ eblos manĝi. - Not now, but soon, it will be possible to eat.

nur - only

- Nur mi povas doni al vi tiun informon. - Only I can give you that information.
- Mi povas doni al vi nur tiun informon. - I can give you only that information.
- Nur poste mi povos renkonti vin. - Only later will I be able to meet you.

ofte - often

- Mi iras al la teatro ofte nuntempe. - I have been going to the theatre often lately.
- Ofta pluvo dum la vintro estas ĝena. - Frequent rain during the winter is annoying.
- Dum la lastaj tagoj viaj vizitoj oftigis. - During recent days, your visits became frequent.

ok - eight

- Ok estas mia plej ŝatata numero. - Eight is my favourite number.
- Rigardu la okan paĝon de la libro. - Look at the eighth page of the book.
- Mi dividos la torton en okonoj. - I will divide the pie into eighths.

okazi (ntr) – to happen, to take place

- Mi rakontos al vi, kio okazis hieraŭ. - I will tell you what happened yesterday.
- Pro tiu okazaĵo mi ne povis trankviliĝi. - Because of that event, I couldn't calm down.
- Oni kantis okaze de la nacia festo. - Someone sang for the occasion of the national holiday.
- Kial nenio okazas? - Why isn't anything happening?

ol - than

- Vi estas pli alta ol ŝi. - You are taller than her.
- Mi kuras malpli rapide ol vi. - I run less quickly than you.
- Mi multe pensis antaŭ ol verki la eseon. - I thought much before writing the essay.

oni – one, someone

- Oni diras, ke la ekzameno estas facila. - It is said [one says] that the exam is easy.
- Mi neniam atentis onidirojn. - I never pay attention to rumours [someone-sayings].
- Onia malfeliĉo ne estas facile eltenebla. - Someone's unhappiness isn't easy to tolerate.

opinio - opinion

- Mia opinio pri Esperanto estas konata. - My opinion about Esperanto is known.
- Mi opinias, ke tiu laboro estas farebla. - My opinion is that that work is doable.
- Mi samopinias kun vi. - I agree [same-opine] with you.

organizi (tr) – to organise

- Vendrede ni organizos grandan feston. - On Friday, we will organise a large party.
- La organizantoj de la kongreso dormas. - The organisers of the convention are sleeping.
- AdE estas lingva organizo. - AdE is a language organisation.

pagi (tr) – to pay

- En restoracio oni devas pagi por la manĝo. - In a restaurant, you have to pay for the meal.
- Jen via monata pago! - Here is your monthly payment!
- Tiu broŝuro estas senpaga. - That brochure is free of charge [payment-free].

paĝo - page

- Libro konsistas el skribitaj paĝoj. - Books consist of written pages.
- Paĝo havas du flankojn. - A page has two sides.

- Ŝi kapablas krei belajn retpaĝojn. - She is capable of creating beautiful webpages.

pano - bread

- Ili aĉetis nur blankan panon. - They bought only white bread.
- Ni manĝas panon el sekalo. - We eat rye bread.
- Jen faruno por fari panon. - Here is flour for making bread.

papero - paper

- Oni povas skribi sur papero. - One can write on paper.
- Ŝi havas paperan sakon. - She has a paper bag.
- La neceseja papero elĉerpiĝis. - The toilet paper ran out.

pardonĭ (tr) – to pardon

- Pardonu min! - Pardon me!
- Li preskaŭ neniam pardonpetas. - He almost never apologises [requests pardon].
- Mi petas pardonon. - I apologise [request pardon].

paroli (x) – to speak

- Ĉu vi parolas Esperanton? - Do you speak Esperanto?
- Ŝi estas tre bona parolanto. - She is a very good speaker.
- Mi trapasis la parolan ekzamenon. - I passed the oral [spoken] examination.

parto - part

- La kuko estis dividita en du partojn. - The cake was divided into two parts.
- Ĉiu ricevis sian parton. - Each one received his or her part.
- Ni nur parte faris niajn taskojn. - We only partially did our tasks.

patro - father

- Kia patro, tia filo. - Like father, like son.
- Ŝia patro ne estis tre rigora. - Her father wasn't very strict.
- Patro kaj patrino estas gepatroj. - A father and a mother are parents.

peco - piece

- Horloĝo konsistas el multaj pecoj. - A clock consists of many pieces.
- Mi havas pecon da ŝtofo en mia sako. - I have a piece of cloth in my bag.
- Pecigu la panon kaj donu al la birdoj. - Break the bread into pieces and give it to the birds.

pensi (x) – to think

- Mi pensas, do mi ekzistas. - I think, therefore I exist.
- Kiu multe babilas, malmulte pensas. - He who chats much, thinks little.
- Legado de libro ofte estas pensiga. - Reading a book is often thought-provoking.

per – by means of

- Hodiaŭ ni manĝas per forko kaj kulero. - Today we are eating with a fork and spoon.

- Homo ne vivas nur per pano. - A person doesn't live only through bread.
- Mi veturos al Milano kun ŝi per aŭto. - I will drive to Milan with her by car.

perdi (tr) – to lose

- Mi perdis mian monujon hieraŭ. - I lost my wallet yesterday.
- Lia morto estis perdego por ni ĉiuj. - His death was a great loss for us all.
- Ne perdu vian paciencon! - Don't lose your patience!

permesi (tr) – to permit

- La reĝo donis al li la permeson foriri. - The king gave him permission to depart.
- Fumado estas malpermesata ĉie tie. - Smoking is forbidden [opposite-permitted] here.
- Bonvolu permesi al mi eniri! - Please permit me to enter!

persono - person

- Ĉiu ŝatas personon similan al si mem. - Everyone likes a person similar to him or herself.
- Jen mia persona opinio pri tio. - Here is my personal opinion about that.
- Multaj personoj iris al li por protesti. - Many people went to him to protest.

peti (tr) – to request, to ask for

- Mi petas vian pardonon. - I ask for your pardon.
- Ne petu min pri mono, ĉar mi ne havas. - Please don't request money from me, because I haven't any.
- Ĉu vi havas iun lastan peton? - Do you have any last request?

piedo - food

- Ne veturu sed iru per viaj piedoj. - Don't drive, but go on your feet.
- Ĉu vi piediras al via lernejo? - Do you walk to your school?
- Piedbatu la pilkon forte. - Kick [foot hit] the ball hard.

plaĉi (ntr) – to please

- Ĉi tiu libro ne plaĉas al mi. - I don't like this book. [it isn't pleasing to me]
- Vi tre plaĉas al mi. - I like you very much. [you're very pleasing to me]
- Li estas plaĉa en multaj manieroj. - He is pleasing in many ways.

plej - most

- Venuso estis la plej bela greka diino. - Venus was the most beautiful Greek goddess.
- Li kuras plej rapide el ni ĉiuj. - He runs most quickly of all of us.
- Ŝi estas la malplej riĉa el ili. - She is the poorest of them.

plena - full

- Li donis al mi tekston plenan je eraroj. - He gave me a text full of errors.
- Mi plene konsentas kun vi. - I fully agree with you.
- Plenigu ĉi tiun formularon, mi petas. - Fill out this form, please.

pli - more

- Vi estas pli saĝa ol ili. - You are wiser [more wise] than them.
- Mi konas la anglan malpli bone ol vi. - I know English less well than you.
- Indus iom plibonigi tiun programon. - It'd be worthwhile to improve that program somewhat.

plu – furthermore, continuing, anymore

- Ne plu pluvas. - It's not raining anymore.
- Ĉu ni pluiru? - Should we keep going?
- Mi ne plu loĝas en Rio. - I don't live in Rio anymore.

popolo – a people

- En tiu lando vivas popolo tre malriĉa. - A very poor people lives in that country.
- Proverboj venas el la popola cerbo. - Proverbs come from the mind of the people.
- Ĉu vi ŝatas popolmuzikon? - Do you like folk [people's] music?

por - for

- La patrino aĉetis donacon por sia filino. - The mother bought a gift for her daughter.
- Ili venis por vidi nin ludi tenison. - They came to see us play tennis.
- Tio estas nur portempa solvo. - That is only a temporary [for time] solution.

pordo - door

- Ĉu vi ŝatus malfermi la pordon? - Would you like to open the door?
- Inter la du ĉambroj estas ŝlosita pordo. - Between the two rooms there is a locked door.
- Pasaĝeroj iru al la pordo 12-a. - Passengers should go to gate 12.

porti (tr) – to carry, to bring

- Bonvolu porti al mi vian dorsosakon. - Please bring me your backpack.
- Estus bone se ĉiuj kunportus manĝaĵon. - It would be good if everyone could bring food.
- La peza valizo apenaŭ estas portebla. - The heavy suitcase can hardly be carried.

post - after

- Post pluvo venas suno. - After rain comes sun.
- La infano kaŝas sin malantaŭ la arbego. - The child hides behind the huge tree.
- Ŝi venis posttagmeze la postan tagon. - She came the next day, in the afternoon.

poŝto - post, mail

- La poŝto bone funkcias en nia lando. - The postal system works well in our country.
- La poŝto de hodiaŭ ankoraŭ ne alvenis. - Today's mail hasn't arrived yet.
- Mi ŝatas ricevi poŝtkarton. - I like receiving a postcard.

povi (tr) - to be able

- Ne ĉiuj povas bele kanti. - Not everyone can sing nicely.
- Mi estas laca, sed ne povas endormiĝi. - I'm tired but can't get to sleep.
- Povas esti ke tio bone funkcios. - It could be that that will work well.

preni (tr) - to take

- Preni fajron per la manoj ne eblas. - You can't pick up fire with your hands.
- Forprenu la manojn de la tablo. - Take your hands off the table.
- Mi reprenas mian lastan diraĵon. - I take back what I just said.

preskaŭ - almost

- Ni preskaŭ alvenis al la urbo. - We've almost arrived at the town.
- Preskaŭ ĉiuj volis tuj danci. - Almost everyone wanted to dance straight away.

prezenti (tr) - to present

- Mi prezentos al vi mian pli aĝan fraton. - I will introduce my older brother to you.
- Vi faris tre bonan prezenton hodiaŭ. - You gave a very good presentation today.
- Ili misprezentis la faktojn, laŭ mi. - They misrepresented the facts, in my opinion.

pri - about, concerning

- Ili parolas pri vi nun. - They're talking about you now.
- Pripensu ĉu vi volas veni aŭ ne. - Consider whether or not you want to come.
- Kion ni priparolu dum la kunsido? - What should we discuss during the meeting?

pro - because of

- Mi dankas pro tio, kion vi faris por mi. - I'm grateful for what you've done for me.
- Jen la kaŭzo, pro kiu mi ne povis veni. - That's the reason why I couldn't come.
- Mi enlitiĝis frue pro tio ke mi estis laca. - I went to bed early because I was tired.

problemo - problem

- Malriĉeco estas granda problemo. - Poverty is a big problem.
- Ni ankoraŭ havas kelkajn problemetojn. - We still have a few minor issues.
- Senprobleme! - No problem!

proksima – near, close

- Tiuj du pentraĵoj estas tro proksimaj. - Those two paintings are too close.
- Pekino estas malproksima de Londono. - Beijing is a long way from London.
- Ili staris proksime al la pordo. - They were standing near the door.
- Proksimume kiom da homoj venos? - Roughly how many people will be coming?

provi (tr) - to try

- Provu salti super ĉi tiun arbuston. - Try and jump over this bush.
- Mi provas kompreni la problemon. - I'm trying to understand the problem.
- Li provas sian novan motorciklon. - He's trying out his new motorbike.

pura - clean, pure

- Mi ĉiam havas puran ĉemizon sur mi. - I always have a clean shirt on.
- Purigu la tablon antaŭ la manĝo. - Clean the table before the meal.
- Mi posedas juvelon el pura oro. - I own a jewel of pure gold.

radio - ray, radio

- La radioj de la suno varmigas. - The sun's rays are warming.
- Mi aŭskultas radion kiam mi kuiras. - I listen to the radio when I'm cooking.
- Beleco radias el lia vizaĝo. - Beauty radiates from his face.

rajto - right, entitlement

- Mi havas rajton loĝi en ĉi tiu lando. - I have the right to live in this country.
- Ĉu mi rajtas spekti filmon nun? - Can I watch a film now?
- La homaj rajtoj estas ege gravaj. - Human rights are extremely important.

rakonti (tr) - to narrate, tell a story

- Kial vi rakontis tion al mi? - Why did you recount that to me?
- Mi ŝatas aŭskulti rakontojn. - I like listening to stories.
- Vi estas sperta rakontisto. - You're an experienced storyteller.

rapida – quick, fast

- Ŝia nova aŭto estas tre rapida. - Her new car is very fast.
- Li laboras tro malrapide hodiaŭ. - He's working too slowly today.
- Ĉu vi ŝatas rapidmanĝaĵon? - Do you like fast food?

raporti (tr) - to report

- Ni raportis la problemojn al niaj estroj. - We reported the problems to our bosses.
- Ĝis morgaŭ mi devas verki raporton. - I have to write a report by tomorrow.
- Ĵurnalisto sendis raporton pri la milito. - A journalist has sent a report about the war.

renkonti (tr) - to meet

- Mi ĉiumatene renkontas lin ĉi tie. - I meet him here every morning.
- Ili ĉeestis la renkontiĝon hieraŭ. - They were at the meeting yesterday.
- Ĉu ni renkontiĝis iam antaŭe? - Have we met before, at some point?

respondi (tr) - to answer

- Mi provis respondi ĉiujn demandojn. - I try to reply to all questions.
- Al tiu demando ne ekzistas respondo. - There is no answer to that question.
- Kiu respondecas pri la ekonomio ĉe vi? - Who is in charge of the economy where you are?

resti (ntr) - to stay, remain

- Ili restis en ĉi tiu urbo dum 30 jaroj. - They stayed in this town for 30 years.
- Post la aĉetoj ne plu restos mono. - There'll be no money left after the purchases.
- Mi petis restadpermeson antaŭ jaro. - I asked for a stay permit a year ago.

ricevi (tr) - to receive

- Mi ricevis valoran donacon de ŝi. - I received a valuable gift from her.
- Doni ovon, por ricevi bovon. - Give an egg to receive an ox (*proverb*).
- Li eble ŝatus ricevi la ludilon nun. - He might like to get the toy back now.

riĉa - rich

- Homo kun multe da mono estas riĉa. - A person with lots of money is rich.
- En mia urboparto loĝas multaj malriĉuloj. - A lot of poor people live in my part of town.
- En la lasta jaro ŝi riĉiĝis dank' al siaj akcioj. - In the last year her shares have made her rich.

ridi (ntr) - to laugh

- Plej bone ridas tiu, kiu ridas laste. - He who laughs last, laughs longest.
- Ŝi ridetis al mi kiam ni renkontiĝis. - She smiled at me when we met.
- Lia ideo estas ridinda, laŭ mi. - I think the idea is ridiculous.

rigardi (tr) - to look at

- Mi rigardis rekte al liaj okuloj. - I looked straight into his eyes.
- Rigardu norden kaj ne suden! - Look north and not south!
- Lia rigardo trafis min. - His gaze fell upon me.

rilati (ntr) - to relate

- Ŝia kritiko ne rilatas al mi. - Her criticism doesn't relate to me.
- Ne estas rilato inter la du aferoj. - There is no relation between the two things.
- Rilate al tio mi havas ideon. - Regarding that, I have an idea.

rimarki (tr) - to notice

- Mi ne rimarkis ke li alvenis. - I didn't notice that he had arrived.
- Ĉu vi rimarkis tion? - Did you notice that?
- Mi faris kelkajn rimarkojn pri via artikolo. - I made some remarks about your article.

rompi (tr) - to break

- Atentu por ne rompi la glasojn. - Take care not to break the glasses.
- Ne interrompu min kiam mi parolas. - Don't interrupt me when I'm talking.
- La bela vazo falis kaj rompiĝis. - The beautiful vase fell and broke.

saluti (tr) - to greet

- Mi salutis lin per "Bonan tagon!". - I greeted him with "Good afternoon!"
- Bonvolu sendi vian salutnomon al mi. - Please send me your username.
- Saluton, amikoj! - Hello, friends!

sama - same

- La du ĝemeloj estas preskaŭ tute samaj. - The two twins are almost totally the same.
- La samo okazis al ni antaŭ du monatoj. - The same thing happened to us two months ago.
- Bedaŭrinde ni pensas tre malsame. - Unfortunately we think very differently.

sana - healthy

- Sana menso en sana korpo. - A healthy mind in a healthy body.
- Kuracisto provas kuraci malsanulojn. - A doctor tries to treat the sick.
- Mi malsaniĝis, sed denove resaniĝis. - I fell ill, but I have got better again.

scienco - science

- Fiziko estas scienco tre grava. - Physics is a very important science.
- Tiu raporto estas tute malscienca. - That report is completely unscientific.
- Sciencistoj ofte laboras en universitatoj. - Scientists often work in universities.

scii (tr) - to know

- Mi jam scias tion. - I already know that.
- Li ĵus eksciis ke li perdos sian laboron. - He's just found out that he's going to lose his job.
- Ŝi scipovas paroli en kvar lingvoj. - She knows how to speak in four languages.

se - if

- Se pluvos, mi ne eliros. - If it rains, I won't go out.
- Mi iros al la festo nur se ankaŭ vi iros. - I'll only go to the party if you go too.
- Se vi estus tre riĉa vi ne devus labori. - If you were very rich, you wouldn't have to work.

sed - but

- Lango miela, sed koro kruela. - A tongue like honey, but a cruel heart (*proverb*).
- Mi foriras, sed mi revenos baldaŭ. - I'm going away, but I'll come back soon.
- Ne ŝi sed li faris tion. - That was done not by her, but by him.

seĝo - chair

- Normale ni sidas sur seĝoj. - Normally we sit on chairs.
- Apud la tablo estis kvar brakseĝoj. - By the table there were four armchairs.
- Mi uzas rulseĝon dum dek jaroj. - I've been using a wheelchair for ten years.

sekvi (tr) - to follow

- Jozefo sekvis Johanon ĝis la urbo. - Joseph followed John as far as the town.
- Mi verŝajne ne sekvos viajn konsilojn. - I probably won't take your advice.
- Post somero sekvas aŭtuno. - Autumn follows after summer.

semajno - week

- Semajno konsistas el sep tagoj. - A week consists of seven days.
- Semajnfine oni kutime ne laboras. - People don't usually work at weekends.
- En monato estas kvar semajnoj. - There are four weeks in a month.

sen - without

- Mi ŝatas teon sen sukero kaj sen lakto. - I like tea with no sugar and without milk.
- La strato estis tute senhoma. - The street was entirely deserted.
- Mi ricevis la biciklon senpage de ŝi. - I received the bicycle from her for free.

sendi (tr) - to send

- Mi sendos al vi leteron per la poŝto. - I will send you a letter by post.
- Kelkaj dissendas multe da spamo. - Some people send out a lot of spam.
- Resendu la pakaĵon se vi ne volas ĝin. - Send the parcel back if you don't want it.

senti (tr) - to feel

- Dum somero mi ŝatas senti varmon. - During the summer I like to feel the warmth.
- Sentiĝas tre bone esti kun vi ĉi tie. - It feels very good to be here with you.
- Mi sentis, ke tio ne estas ĝusta decido. - I felt that wasn't the right decision.

sep - seven

- En unu semajno estas sep tagoj. - There are seven days in one week.
- La nombro sep estas inter ses kaj ok. - The number seven is between six and eight.

serĉi (tr) - to look for, to search for

- Estas malfacile serĉi ion en mallumo. - It's difficult to look for something in the dark.
- Ŝi longe serĉis solvon de la problemo. - She searched long for a solution to the problem.
- La polico traserĉis la domon senrezulte. - The police searched the house in vain.

servi (x) - to serve

- Servi du homojn samtempe, malfacilas. - It's hard to serve two people at the same time.
- La servisto alportis la manĝaĵojn. - The servant brought the meals.
- Nia ttt-servilo kelkfoje paneas. - Our web server sometimes crashes.

ses - six

- Ses estas cifero inter kvin kaj sep. - Six is the digit between five and seven.
- Laŭ la Biblio la tero kreiĝis en ses tagoj. - The Bible says the earth was created in six days.

si - oneself

- La homoj ĉefe pensas pri si mem. - People think mostly about themselves.
- Ŝi lavas sin ĉiumatene. - She has a wash every morning.
- La gepatroj amas siajn infanojn. - The parents love their children.

sidi (ntr) - to sit

- Ni sidis surseĝe dum tri horoj. - We sat on chairs for three hours.
- Ŝi eksidis sur la sofon. - She sat down on the sofa.
- Ĉu tiu sidloko estas libera? - Is that seat free?
- Sidiĝu, mi petas. - Sit down, please.

simila - similar

- La du fratinoj estas tre similaj. - The two sisters are very similar.
- Mi simile pensas, sed ne tute same. - My thoughts are similar, but not quite the same.
- La sveda lingvo similas al la norvega. - The Swedish language is like Norwegian.

simpla - simple

- Mi kreis simplan komputilprogramon. - I've created a simple computer program.
- Per simpla metodo oni kuiras ovon. - You cook an egg using a simple method.
- Fari tion estas tre simple. - It's very simple to do that.

sinjoro - Mr, sir

- Sinjoro Ivo kaj sinjorino Iva estas geedzoj. - Mr Ivo and Mrs Iva are a married couple.
- Estimataj gesinjoroj, mi ĝojas vidi vin! - Ladies and gentlemen, I am delighted to see you!

situacio - situation

- Mia persona situacio estas malfacila. - My personal situation is difficult.
- Klarigu al mi la situacion en via lando. - Explain to me the situation in your country.
- Bonŝance ŝi savis la situacion. - Luckily she rescued the situation.

skribi (tr) - to write

- Foje mi skribas mane, foje komputile. - Sometimes I write by hand, sometimes by computer.
- Kraĵono estas skribilo. - A pencil is a writing implement.
- Mi skribis leteron al mia bona amiko. - I wrote a letter to my good friend.

sola - alone

- Kial vi staras tie tute sola? - Why are you standing there all alone?
- Mi sola faris tion sen la helpo de aliaj. - I did that on my own, without the help of others.
- Malfeliĉo malofte venas sole. - A misfortune seldom occurs by itself (*proverb*).

soni (ntr) - to sound

- Barelo malplena sonas plej laŭte. - An empty barrel sounds loudest (*proverb*).
- Oni aŭdas sonojn de voĉoj el la strato. - Sounds of voices can be heard from the street.
- Laŭdire ŝi havas absolutan sonsenton. - They say she has perfect pitch.

stari (ntr) - to stand

- Botelo da rizlakto staras sur la tablo. - There's a bottle of rice milk standing on the table.
- Iuj sidas, aliaj homoj staras enŭrajne. - Some people in the train are seated, others are standing.
- Starigu la seĝon, mi petas. - Stand the chair up, please.

strato - street

- Miaurbe estas multegaj stratoj. - In my town there are lots and lots of streets.
- Mi loĝas en Strato Z je la numero 24-a. - I live at 24, Z Street.
- Transiru la straton ĉe la trafik-lumo. - Cross the street at the traffic lights.

studi (tr) - to study

- Ŝi studas fizikon en la universitato. - She's studying physics at university.
- Ne ĉiuj studentoj studas diligente. - Not all students study diligently.
- Estus bone fari studon pri Esperanto. - It would be good to do a study of Esperanto.

sub - under

- La muso kuras sub la lito. - The mouse is under the bed, running around.
- La muso kuras sub la liton. - The mouse runs (away) under the bed.
- Neniu volas esti subpremita. - Nobody want to be suppressed.

sufiĉa - enough, sufficient

- Tiu mono estas sufiĉa por via vojaĝo. - That money is enough for your journey.
- Nun sufiĉas! - Enough now!
- Vi laboris pli ol estas sufiĉe hodiaŭ. - You've done more than enough work today.

sukcesi (ntr) - to succeed

- Li sukcesis pri siaj ekzamenoj. - He passed his exams.
- Ŝi sukcese atingis la finan diplomon. - She successfully gained her final degree.
- Ni malsukcesis en la piedpilka ludo. - We failed in the football match.

suno - sun

- Somere la suno brilas varme mialande. - In the summer in my country the sunshine is warm.
- La suno fakte estas stelo. - The sun is actually a star.
- Suna tago estas pli agrabla ol pluva. - A sunny day is more enjoyable than a rainy one.

super - over, above

- La aviadilo flugas super la urbo. - The plane flies over the town.
- Tiu tasko estas super miaj kapabloj. - That task is beyond my abilities.
- Riĉuloj ofte apartenas al supera klaso. - Rich people often belong to an upper class.

supre - at the top, up high

- Supre en la frostujo estas buterpakaĵo. - At the top of the freezer there's a pack of butter.
- La supra parto de domo estas tegmento. - The topmost part of a house is the roof.
- Ni iru supren al la pinto de la monto! - Let's go up to the top of the mountain!

sur - on

- Sur la tablo kuŝas multaj libroj. - There are lots of books lying on the table.
- Li ĵetis la ŝlosilojn sur la tablon. - He threw the keys onto the table.
- Surmetu vian jakon ĉar malvarmas. - Put your jacket on, because it's cold.

ŝajni (ntr) - to seem

- Vi ŝajnas tre kontenta hodiaŭ. - You seem very content today.
- Ŝajne multe pluvos morgaŭ. - Apparently it's going to rain a lot tomorrow.
- Ŝajnas al mi, ke vi estas bona verkisto. - It seems to me you're a good author.
- Ili verŝajne nur ŝajnigas dormi. - They're probably only pretending to sleep.

ŝanĝi (tr) - to change

- Mi volas ŝanĝi mian aŭton al pli nova. - I want to change my car for a newer one.
- Ĉiutage vi ŝanĝas vian ĉemizon. - Every day you change your shirt.
- La interŝanĝo estas utila por ambaŭ landoj. - The exchange is useful for both countries.

ŝati (tr) - to like, think highly of

- Mi ŝatas vin preskaŭ ĉiam. - I almost always think highly of you.
- Esperanto estas mia ŝatokupo. - Esperanto is my hobby.

- Ili malŝatas unu la alian. - They dislike each other.

ŝi - she

- Maria foriris. Ŝi iris al la lernejo. - Maria has left. She's gone to school.
- Jen mia edzino, mi demandos ŝin. - Here's my wife, I'll ask her.
- Ŝi aĉetis belan jupon kaj robon al mi. - She bought me a lovely skirt and a dress.

ŝipo - ship

- Granda ŝipo povas transiri oceanojn. - A large ship can cross oceans.
- Ĉu vi vojaĝos per ŝipo? - Will you be travelling by ship?
- La ŝipestro konstante fumis pipon. - The skipper was constantly smoking a pipe.

tablo - table

- Ni manĝis ĉe la sama tablo kiel hieraŭ. - We ate at the same table as yesterday.
- Metu la manĝilaron sur la tablon. - Put the knives and forks on the table.
- Ni kunsidis ĉirkaŭ granda tablo. - We held a meeting around a large table.

tago - day

- En jaro estas tricent sesdek kvin tagoj. - There are 365 days in a year.
- Ĉi tiu estas la plej bela tago de mia vivo. - This is the loveliest day of my life.
- Ĉiutage mi volas paroli en Esperanto. - I want to speak in Esperanto every day.

tamen - however

- Mi estas juna. Mi tamen jam finstudis. - I'm young. However, I haven't yet finished studying.
- Pluvas, sed ni tamen eliru, ĉu ne? - It's raining, but let's go out anyway, shall we?

teatro - theatre

- Aktoroj ofte laboras en teatroj. - Actors often work in theatres.
- Teatraj dramoj povas esti tre interesaj. - Theatrical dramas can be very interesting.
- En nia urbo estas granda teatro. - In our town there is a large theatre.

tempo - time

- Tempo estas mono. - Time is money.
- Mi ne havas tempon resti pli longe. - I don't have time to stay longer.
- De tempo al tempo ni kverelas hejme. - From time to time we quarrel at home.

teni (tr) - to hold, to keep

- Ĉu mi rajtas teni vian manon? - Can I hold your hand?
- Tenu min informita, mi petas. - Keep me informed, please.
- Mi forte tenis la tenilon de la kaserolo. - I gripped the handle of the saucepan tightly.

tero - earth

- La tero estas nia hejmo. - The earth is our home.
- Infano miksis teron, akvon kaj koton. - A child mixed earth, water and mud.

- Kiam la aviadilo surteriĝos? - When will the plane land?
- El terpomoj eblas fari fritojn kaj ĉipsojn. - French fries and chips can be made from potatoes.

tia - such, that kind of

- Kia patro, tia filo. - Like father, like son.
- Io tia. - Something like that.
- Mi prenos la robon tia, kia ĝi estas. - I'll take the dress such as it is.

tial - therefore, so

- Vi mendis salaton, tial vi pagu ĝin. - You ordered a salad, so you should pay for it.
- Hodiaŭ varmegas, tial mi volas iri al lago. - It's hot today, so I want to go to a lake.

tiam - then

- Mi estis en parko, kaj tiam ŝi telefonis. - I was in a park, and that was when she phoned.
- Kiam mi estis juna, tiam mi iom sportis. - When I was young, I used to play some sport then.

tie - there

- Mi estis sur sofo, kaj tie mi endormiĝis. - I was on a sofa, and there I fell asleep.
- Iru tien nun, ne restu ĉi tie. - Go there now, don't stay here.

tiel - thus, so, as

- Mi faris tiel, ĉar vi diris ke mi faru tiel. - I did so because you told me to do so.
- Ŝi estas tiel forta kiel vi. - She is as strong as you.
- Tiel funkcias la mondo. - That's how the world works.

timi (tr) - fear

- Mi kelkfoje timas hundojn. - I'm sometimes frightened of dogs.
- Lia filo estas tre timema infano. - His son is a very shy child.
- Ne timigu mi tiel! - Don't scare me like that!
- Kiam mi vidis ilin mi ektimis. - When I saw them, I was afraid.

tio - that (thing)

- Kio estas tio? - What's that?
- Kion tio signifas? - What does that mean?
- Tio, kion ni havas, estas io tre valora. - What we have is a very valuable thing.

tiom - so much, so many, so, as

- Tiom da akvo, kiom estas en glaso. - As much water as there is in a glass.
- Ŝi estas tiom granda, kiom saĝa. - She is as large as she is wise.
- Tiom da stultaĵoj mi neniam aŭdis. - I have never heard so many stupid things.

tiu - that (one)

- Ĉu tiu estas via patro? - Is that your father?
- Mi ŝatas tiun ideon. - I like that idea.

- Plej bone ridas tiu, kiu laste ridas. - He who laughs last, laughs longest.

tra - through

- La fumo eliris tra la fenestro. - The smoke went out through the window.
- Ili promenis tra la parko. - They walked through the park.
- La fiŝo naĝas tra la akvo de la rivero. - The fish swam through the water of the river.

trans - across

- Ŝi loĝas trans la rivero en alia urboparto. - She lives over the river in another part of town.
- Ĉu ni transiru la trajnotrakon ĉi tie? - Shall we cross the railway track here?
- La junuloj saltis trans la arbuston. - The youngsters jumped over the bush.

tre - very

- Mi tre ŝatas vin. - I like you very much.
- En ĉi tiu supo estas tre multe da likvaĵo. - There is too much liquid in this soup.
- Ĉi tiu kuko estas tre dolĉa. - This cake is very sweet.

tri - three

- Tri estas la duono de ses. - Three is half of six.
- Ni manĝas tri fojojn tage, matene, tagmeze kaj vespere. - We eat three times a day, in the morning, afternoon and evening.

trinki (tr) - to drink

- Mi ne trinkas vinon. - I don't drink wine.
- Mi estas tre soifa kaj ŝatus ion trinki. - I'm thirsty and would like something to drink.
- Ĉu vi volas trinki kafon? - Do you want to drink coffee?

tro - too, too much

- Nia domo estas tro malgranda por ni. - Our house is too small for us.
- Nun vi troigas! - Now you're exaggerating!
- Mi havas maltro da amikoj. - I have too few friends.

trovi (tr) - to find

- Se vi serĉos vi verŝajne trovos. - If you search, you will probably find.
- Mi perdis la monujon, sed poste trovis ĝin. - I lost my coin purse, but found it later.
- Kie troviĝas la necesejo? - Where can I find the toilet?

tuj - immediately

- Mi venos tuj. - I will come at once.
- Pli valoras tuj ovo ol poste bovo. - An egg now is worth more than an ox later (*proverb*).
- Mi dankis lin pro lia tuja respondo. - I thanked him for his immediate response.

tuta - whole, entire

- La tuta urbo venis por saluti la reĝon. - The whole town came to greet the king.

- Dum li parolis, mi dormis la tutan tempon. - While he was talking, I slept the entire time.
- Mi estas tute kontenta pri via laboro. - I am completely satisfied with your work.

unu - one

- La trajno ekveturos post unu horo. - The train will depart in one hour.
- Unue mi devas lavi la manojn. - First I must wash my hands.
- Tio ĉi estas mia unua kongreso. - This is my first convention.
- Kiu venos unua en la akvon? - Who will be the first to come into the water?

urbo - town, city

- Li loĝas ekster la urbo en antaŭurbo. - He lives outside the city in a suburb.
- Ĉu ni iru urben morgaŭvespere? - Shall we go into town tomorrow evening?
- La urba trafiko estas tre brua. - The traffic in the city is very noisy.

uzi (tr) - to use

- Ili neniam uzis tiun aparaton. - They have never used that device.
- Mi aĉetis uzitajn vestaĵojn. - I've bought some second-hand clothes.
- Ĉu la malnova bicikolo estas uzebla? - Is the old bicycle usable?
- Kiom da uzantoj havas tiu paĝaro? - How many users does that site have?

valori (x) - to be valuable

- Oro pli valoras ol arĝento. - Gold is worth more than silver.
- La infanoj estas la plej valoraj por mi. - The children are the most precious to me.
- Dum vojaĝo kaŝu viajn valoraĵojn. - While travelling, hide your valuables.

varma - warm

- Forĝu feron dum ĝi estas varmega. - Strike while the iron's hot.
- Mi frostas. Ĉu vi povus varmigi min? - I'm freezing. Could you warm me up?
- Vespere iĝos iom malvarme. - In the evening it will get rather cold.
- Li suferas pro intensa malvarmumo. - He's suffering from a heavy cold.

vendi (tr) - to sell

- Ili vendas librojn malmultekoste. - They're selling books cheaply.
- Mi ankoraŭ devas iri al la vendejo. - I still have to go to the shop.
- Printempe vendiĝas multaj bicikloj. - In the spring, lots of bicycles are sold.

veni (ntr) - to come

- Venu ĉi tien tuj! - Come here at once!
- Mi revenos postmorgaŭ. - I will return the day after tomorrow.
- Bonvenon! - Welcome!

vera - true

- Vi estas vera amiko! - You're a true friend!
- Mensogo kaj eraro estas malveraĵoj. - A lie and a mistake are things that are untrue.

- Ĉu vere? - Really?

vespero - evening

- Baldaŭ estos vespero kaj mallumiĝos. - Soon it'll be evening and it'll get dark.
- Mi venos iam vespere. - I'll come some time in the evening.
- Ĉu vi volas vespermanĝi kun ni? - Do you want to have dinner with us?

veturi (ntr) - to travel, to go (by vehicle)

- Ĉu ni veturu per bicikloj aŭ per aŭto? - Shall we go on our bicycles or in a car?
- Kiam ekveturos la trajno al Moskvo? - When does the train leave for Moscow?
- Ŝi veturigos nin al la strando. - She's going to drive us to the beach.

vi - you

- Vi estas tre bonvena! - You're very welcome!
- Vian pasporton, mi petas. - Your passport, please.
- Viaj infanoj estas tre afablaj. - Your children are very kind.

vidi (tr) - to see

- Ĉu vi vidas ilin trans la strato? - Can you see them on the other side of the road?
- Ĝis revido! - Goodbye! / See you!
- Ni vizitos kelkajn vidindaĵojn. - We will be touring some sights.

viro - man

- Viroj kaj virinoj estu egalaj. - Let men and women be equal.
- Virina rideto pli kaptas ol reto. - A woman's smile catches more than a net (*proverb*).
- La virbovo atakis la matadoron. - The bull attacked the matador.

vivi (ntr) - to live

- Ni vivas en vilaĝo apud la urbo. - We live in a village near the town.
- Plaĉas al mi la interkultura vivstilo. - I like the intercultural lifestyle.
- Kiu vivos, tiu vidos. - He who lives will see (*proverb*).

viziti (tr) - to visit

- Vizitu nin pli ofte! - Visit us more often!
- Ŝia vizito estis sukcesa. - Her visit was a success.
- Pasintsemajne venis multaj vizitantoj. - Last week lots of visitors turned up.

vojaĝi (ntr) - to travel

- Ni ĉiam provas vojaĝi kune. - We always try to travel together.
- Bonan vojaĝon! - Have a good trip! / Bon voyage!
- Mi estas tre vojaĝema. - I'm very fond of travelling.

vojo - way, road

- Mi scias la vojon al la plej proksima kiosko. - I know the way to the nearest kiosk.

- En la urbo estas multaj vojmontriloj. - In the town there are lots of signposts.
- La vojo estas la celo. - The way is the goal.

voli (tr) - to want

- Ĉu vi volas manĝi nun? - Do you want to eat now?
- Vole nevole, li devis cedi pri sia ideo. - Like it or not, he had to give up on his idea.
- Granda parolo, sed malgranda volo. - Much talk, but little will (*proverb*).

vorto - word

- Permesu al mi diri kelkajn vortojn. - Allow me to say a few words.
- Mi legis la vortaron kiel romanon. - I read the dictionary like a novel.
- Per vorto ĝentila ĉio estas pli facila. - A polite word makes everything easier (*proverb*).

zorgi (x) - to care, to care for

- Ne zorgu tro pri tio. Tio iel solviĝos. - Don't worry too much about it. Somehow it'll be solved.
- Li prizorgas sian malsanan patrinon. - He takes care of his sick mother.
- Ili vestis sin tre zorgeme. - They got dressed very carefully.